I don't follow the arguments about cost and time-saving – surely publishing six issues of 'new-magazine' each year is just as expensive (money and time-wise) as publishing two issues of *LBE* and four of *Update* each year?

Another reason to keep *LBE* – it's in its '99th year', so when it reaches its 100th birthday that will be a good excuse for a celebration (i.e. a press release

and publicity event). And if we can keep it going for another 46 issues (i.e. 23 years at the current rate) then it will reach its 1,000th issue (another press release and publicity event). Outside Britain, Esperantists seem to think it's quite important (for morale and publicity purposes) that the home of the English language should nevertheless have a high quality Esperanto-language publication.

Samideane via,
Vilĉjo Walker



Solidareca mesaĝo el Kubo

Karaj esperantistoj,

Ni bezonas helpon de niaj fratesperantistoj por disvastigi Esperanton en nia provinco. Ni havas 108 membrojn sed bezonas materialojn kiel librojn, lernolibrojn por komencantoj, kasedojn ks. por infanoj, gejunuloj kaj maljunaj; krome ni bezonas brajlajn materialojn en Esperanto, ĉar estas dek blinduloj inter ni.

La provinco Granma apartenas al la orienta parto de nia lando, kaj en ĝi estas dek tri municipoj, en kiuj ĉiu havas lernantojn de nia koresponda kurso, sed por ili malfacilas la lernado pro manko de libroj.

Se vi povas helpi, sendu la respondon al: Granma Esperanto-Filio, El Instituto de Amistad con los Pueblos, Delegación Provincial de Granma, por s-ro Rafael

Cabrera, Calle 1 # 150 / 28 y 32, rpto Camilo Cienfuegos, Bayamo 85100 Granma, Kubo; aŭ al: bayamo@crisol.cult.cu; www.crisol.cult.cu.

Koran dankon,
Rafael Cabrera, Kubo



Itala literaturo Esperante

Altestimata Sinjoro,

Ni informas, ke subvencio peto por la Esperanta eldono de la verko *Danteskaj Itineroj* okazis en la kadro de la Itala Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj subtene al disvastigo, en via lando, de la italaj lingvo kaj kulturo pere de nacilingvaj tradukoj de italaj beletraĵoj, kaj do ankaŭ pere de sam-specaj Esperantaj tradukoj.

Danteskaj Itineroj estas 85-paĝa verko en formo de sceneja prezento, pri la vivo kaj verkaro de nia itala ĉefpoeto Dante Alighieri. La verkon aŭtoris la itala dantisto kaj Docento pri Literaturo ĉe la Napola Universitato 'Frederiko la 2-a', prof. Vittorio Russo, forpasinta en la jaro 1997. La Esperantan tradukon prizorgis la itala Esperanto-poeto Nicolino Rossi. La libro *Danteskaj Itineroj* estas mendebla kaj aĉetebla je la prezo de €9,30 ĉe la Libroservo de UEA. Bonvolu informi viajn asociojn pri la eblo aĉeti kaj legi ĉi tiun verkon. Oficiale ni petas vin pozitive reagi al ajna informo ĉi-rilate, al vi adresota fare de la Itala Instituto de

Kulturo vialanda, al kiu ni liveris vian adreson por akiri surlokan pritakson de la verketo, aŭ tian pritakson, eĉ nepetite, havigi al ili.

Ni sincere antaŭdankas pro via ĉi-rilata kunlaboro.

Prof-ino Maria Luisa Russo,
Prezidanto de la Napola
Esperanto-Asocio

[Pro la eldono oni bv. volonte danki, alimaniere vorte subteni aŭ, ankoraŭ pli efike, pritaksi la verkon al: Italian Institute of Culture, Dr Mario Fortunato, 39 Belgrave Square, London SW1X 8NX; rete: ici@italcultur.org.uk.]



Kontakto el Kongolando

Estimataj,

Mi havas grandan honoron kaj samtempe ankaŭ ĝojon skribi al vi nome de EAKO (Esperantista Asocio en Kongolando). Kadre de la tutmonda solidareco kaj kompreniĝo pere de Esperanto, EAKO klopodas kontakti esperantistojn mondscale. Ni deziras havi kompaktdiskojn de Esperanto pri la Esperanto-movado, librojn, gazetojn kaj aliajn legaĵojn. Se vidbendojn vi posedas, bonvolu sendi.

Antaŭajn dankojn!

Samideane,
Kounda Voumi Fidele,
Prezidanto de EAKO
P.O. Kesto 4728,
Pointe Noire, Congo/
Brazzaville;
fidelkoundav@hotmail.com.

Rumana–Esperanta vortaro urĝe bezonata

Estas apenaŭ nekredible, sed ankoraŭ troviĝas eŭropaj landoj, kie ne ekzistas taŭga Esperanta vortaro, kvankam oni ja entuziasme lernas la lingvon, ekzemple Rumanio, kie oni dum jardekoj persekutis Esperanton.

- Jam aperis poŝvortareto de Ionel Oneț (kun pardonpeto pro ĉiuj mankantaj super- kaj subsignoj!), kaj vi eble ne kredos, sed la tuta eldono jam elĉerpiĝis. Oni nun esperas povi reeldoni ĝin sub la nova titolo *Dictionar pentru incepatori* 'Vortaro por komencantoj', sed ĉi-foje kun ĉiuj kromsignoj!
- Sed oni bezonas 300 eŭrojn por kunfinanci la eldonon. Se vi deziras helpi la eldonadon, bonvolu sendi vian kontribuon al UEA por la Fondaĵo Edukado, indikante: 'Por rumana vortaro'. Tiuj, kiuj donacos pli ol 30 eŭrojn, ricevos ekzempleron de la vortareto kiel dankesperimon.

A selection of books

The titles below are just a few of the many books EAB stocks. If you wish to purchase, please make your cheque payable to 'Esperanto-Asocio de Britio', and remember to add 15% (min. 25p) to the total order to cover post and packing. Orders over £45 are post free. Request a full list of titles from the office (see full address, etc. on page 2).



☞ *La Bato* Lena Karpunina. Publ. FEL. 125p. Fifteen original stories, mostly about life in the Soviet Union. The author is a winner of literature prizes. £8.30

☞ *Being Colloquial in Esperanto* David K. Jordan. Publ. ELNA (USA). 232p. Hardback. Referenced grammar book for 'progresintoj' with many examples and a full list of 'false friends'. £12.10

☞ *Comprehensive English–Esperanto Dictionary* Peter Benson. Publ. ELNA (USA). 607p. The fullest and most up-to-date English–Esperanto dictionary, with 28,000 headings. Hardback. £19.20

☞ *Ĉu Li Venis Trakosme?* Johán Valano. 144p. Spies, murders, intrigue. Original work, good style. £5.50

☞ *Ĉu Ŝi Mortu Tra-fike?* Johán Balano. 74p. Crime and sex fantasy in well-written 'but not-quite-decent' language. £7.00

☞ *Ĉu Vi Kuiras Ĉine?* Johán Valano. 135p. Detective novel, first in the series, amusing reading for 'progresantoj'. £9.00

☞ *Esperanto – Learning and Using the International Language* David Richardson. Publ. USA. 368p. Combined information: teaching and reading book on the value of Esperanto;

modern and attractive. Hardback. £9.60

☞ *Fondita sur Roko* Albert Goodheir. 37p. Study of the ideas of Dutch philosopher Spinoza. £1.78

☞ *Kiam Bestoj Parolas* Ed. Katelina Halo and Anna Löwenstein. 23p. Publ. Fondaĵo Afriko. 23p. (A4 format). Charming little stories in basic Esperanto drawn from African folklore; ideal reading material for early students. £2.08

☞ *Mondmapo: Landoj de la Mondo*. 100 x 60cm. £6.50

☞ *Passporta Servo 2003* Publ. TEJO. 200p. Lists of local hosts, with maps; more than 1,000 addresses in 75 countries; open to all Esperanto-speakers. £10.00

☞ *Pocket Esperanto Dictionary* (two-way) Andrew McLinen. Publ. UEA (2nd ed.) 406p. More than 70,000 words and expressions; up-to-date, clear and comprehensive. 16 x 11cm. £10.50

☞ *La Reveno de la Reĝo* (tria parto de *La Mastro de l' Ringoj*) J.R.R. Tolkien. Trad. W. Auld. Publ. Sezonoj. 399p. Hardback. £12.48

☞ *La Zodiakidoj kaj Aliaj Rakontoj* Rudyard Kipling. Trad. Katelina Halo. Publ. Fonto. 87p. Five short stories from the famous author. £6.45.

HELP!

EAB is continually searching for willing helpers who have an interest or talent in specific areas, or just want to help keep the cogs moving. If you'd like to help with your expertise, please get in touch with the EAB office (tel. 0845 230 1887) or with any member of the Management Committee.

La Eŭropa Konstitucio

La simpozio 'Kian lingvo-politikon al multlingva Eŭropo?' okazis en la Eŭropa Parlamentejo en Bruselo la 6-an de majo, iniciatita kaj preparita de la eŭrop-uniaj Esperanto-aktivuloj, kun forta subteno de UEA.

La simpozion partoprenis neregistaraj organizaĵoj, interesitaj pri justa solvo de la lingvaj problemoj. La simpozio diskutis kaj akceptis principojn pri la komunikadaj rajtoj kaj devoj de la eŭropaj civitanoj, rekomendataj por konsidero en la verkata Eŭropa Konstitucio.

En la plena raporto aperas rekomendo atenti ankaŭ Esperanton 'kiel eblan pedagogian ilon' por plifaciligi la studadon de fremdaj lingvoj. Vidu la retejon <www.europe-citizen.net>.

Universala Kongreso virtuale

La sveda Loka Kongresa Komitato por la ĉi-jara UK en Gotenburgo zorgas ankaŭ por tiuj, kiuj ne sukcesos veni al Svedio. Ĉe la nova retejo <www.uk-2003.net> dum la daŭro de la tuta kongreso funkcios 'Virtuala kongresejo de la 88-a UK'.

La sveda ĉefministro, Göran Persson, akceptis esti la Honora Protektanto de la kongreso.

Tri novaj titoloj

UEA ĉi-jare eldonis du novajn librojn kaj la 'Esperanto-dokumenton' (n-ro 38) *Esperanto kaj internaciaj organizaĵoj*. Oni kolektis rezoluciojn, decidojn kaj rekomendojn de internaciaj organizaĵoj, komencante, kompreneble, de Unesko, favoraj al Esperanto kaj la ideo de internacia lingvo.

Multe pli ampleksa (504-paĝa) estas *Konciza etimologia vortaro*, kompilita de André Cherpillod. La verko ŝajne jam promesas iĝi furoraĵo de la jaro – dum du monatoj post ĝia

apero vendiĝis pli ol cent ekzempleroj.

Kaj meze de aprilo el la presejo venis alia verŝajna furoraĵo: *La vivo de Henriko la Kvina* de Shakespeare, tradukita de Humphrey Tonkin.

Ĉiuj vortaroj

Ĵus pretiĝis en la formatoj html, pdf kaj rtf nova *Bibliografio de Esperanto-vortaroj*, surbaze de la siatempa laboro de Edward Ockey, iama redaktoro de *La Brita Esperantisto*. Kompletigita kaj korektita de Edward Ockey, Geoffrey Sutton, Roy McCoy kaj Andrej Grigorjevskij, ĝi

estas granda finpaŝo al kompleta listo de ĉiuj vortaroj kaj terminaroj Esperantaj iam ajn eldonitaj. Ĝi konsulteblas ĉe: uea.org/dokumentoj/bib/index.

'Magiista' lernbastono

La jam unu-jara ttt-paĝaro www.edukado.net celas servi la instruantojn de la internacia lingvo kaj helpi ĉiujn, kiuj serĉas informojn pri lerniloj, kursoj, ekzamenoj, okazaĵoj pri edukado kaj lingvolernado. En la 'lerniloteko' troviĝas jam pli ol sesdek diversaj ekzercoj, taskoj, testoj (eĉ interaktivaj) kun solvoj, tiel ke ankaŭ memlernantoj povas progresi kaj

amuziĝi. Estas rubriko ankaŭ pri internaciaj kursoj. La redakcio de *Juna Amiko* nomas la servon 'magiista bastono por Esperanto-kursgvidanto'!

Mil-paĝa retejo de UEA

La retejo uea.org komence de aprilo ricevis pli modernan aspekton kaj grandparte aktualigitan enhavon. Laŭ multnombraj reeĥoj, la vizitantoj trovas, ke en ĝi nun eblas pli facile orientiĝi.

Enhave la retejo proksimiĝas al gvidlibro pri la Esperanto-movado: oni trovas listojn de kursejoj, liston de la universitatoj, en kiuj oni instruas Esperanton (kompilitan de G. Pirlot), listojn de fakaj Esperanto-asocioj, regulojn, varbilojn, artikolojn kaj multegajn aliajn utilajn informojn, kiuj ampleksas entute preskaŭ mil paĝojn.

www.europe-citizen.net

Michael Cwik informas, ke la supra retpaĝo al eŭropa Forumo por Lingvaj Rajtoj kaj Kultura Diverseco enhavas multajn uzeblajn dokumentojn.

Nova greka vortaro

Helena Esperanto-Asocio anoncis la aperon de nova greka vortaro, de Spiros Sarafian. Temas pri 1.225-paĝa, tri-voluma vortaro greka-Esperanta, kiu enhavas pli ol 70.000 vortojn, kaj 279-paĝa Esperanta-greka vortaro kun preskaŭ 16.000 radikoj. Pliaj informoj haveblas ĉe retadreso <<mailto:espero@otenet.gr>>.

Humanismo

La ligo Humanitas raportas, ke post malpli ol unu-jara ekzisto ĝi havas jam pli ol 200 anojn el 52 landoj. La ligo lanĉis la unuan humanisman interretan ĵurnalon en Esperantujo: *Humanitas Novaĵoj*; <www.adhumanitatem.com/esper/novajhoj.htm>. □

Membraro ☆ Membership

Examination Successes

– in the Elementary Exam:

Jolien Schittko, Germany

– in the Free Postal Course:

Ms Severine Bolton, Glos.

Peter Taylor, Dunstable

New Members:

Miss S.M. Henderson,

Lanarkshire (we apologise for printing 'Lancashire' in the previous issue)

Paul Roberts, London

William Sinclair, Nottingham

New Supporters:

David Curtis, Weston-super-Mare

Peter Taylor, Dunstable

John C. Watkins, Glamorgan

We announce the death of:

Frank Buckley, Bristol

Edward Carlton, Derriford

Ms Joyce Hunt, Clacton

A.J. Moore, Chelmsford

Ms Ena Shortland, Ipswich

Mrs D.A. Sinclair, Nottingham

J.L. White, Ewell

Abonu al *Juna Amiko*

☆ *Juna Amiko* is an excellent magazine for **school students, beginners of all ages and course leaders**.

☆ Four issues a year. Special rates for group subscriptions available on request.

☆ Se vi instruas Esperanton, se vi lernas, aŭ se vi volas plifortigi vian regionon de la lingvo, aboniu kaj abonigu al la lernejana gazeto!

☆ **Fariĝu patrono de *Juna Amiko*!** Ni urĝe bezonas pliajn abonantojn kaj patronojn por ke – post 30 jaroj – ĝi plu aperu. Helpu doni al *Juna Amiko* estontecon ĉe la geknaboj kaj komencantoj, kiuj estas nia estonteco! El inter la plej aktivaj patronoj ni lotumos libropremion. Patrono abonigas nomitajn personojn aŭ pagas patronajn abonojn por ke la administrado elektu ricevontojn tra la mondo.

☆ Cheques for £8.00 per annual subscription should be made payable to: P. Hewitt (no receipts will be sent unless requested) 26 Highfield Road, North Thoresby, Grimsby DN36 5RT. Tel. 01472 840896; e-mail: paul@esperanto.freesevice.co.uk.

Zam- Zam- Zamenhof: malserioza pritraktado de serioza temo de Paul Gubbins

Eble tiuj, kiuj dum la kongreso en Glasgovo spektis parton de la teatraĵo *Zam- Zam- Zamenhof*, interesiĝos pri la originoj de tiu ĉi 'per-versio' de konata historio. Al tiuj, kiuj ne partoprenis tre riĉan, tre stimulan kongreson, mi klarigu, ke la unua akto de la tri-akta dramo estis prezentata – tekst-en-mane (pro tempomanko la aktoroj legis, ne parkerigis siajn rolojn) – dum la distra vespero de la kongreso.

La praversio de *Zam- Zam- Zamenhof* estas samnoma anglalingva teatraĵo, kiun mi verkis antaŭ ok jaroj kadre de verkanto- (verdire verkonto-) rondo ĉe teatro en Crewe, Cheshire. La angla teatraĵo estis profesie prezentata, same tekst-en-mane, ĉe la teatro. Je mia granda surprizo kaj eĉ pli granda ĝojo, la publiko ridis, ja plengorĝe ridegis: jen mirakla momento en mia vivo, kiam mi malkovris, kio estas ridigi homojn. La franca komediisto Molière (teatra heroo mia) opiniis, ke 'bizara afero estas ridigi honestajn homojn'. Tiun vesperon, en Crewe, mi bone ekkomprenis la bizarecon, samtempe la plezuron ridigi honestajn homojn.

Sed ve – kompatinda ZZZ. Post la furoro (nu, furoreto) en Crewe mi sendis la skripton al diversaj teatroj kaj trupoj: Cheshire tamen montras sin multe pli avangarda kaj grandanima ol aliaj regionoj, ĉar revenis neaj leteroj, kies aŭtoroj klarigis, ke ZZZ ne realigeblas pro tro da rolantoj / sentaŭgas pro la temaro / teatre lamas pro manko de

karaktero-evoluado, ktp, ktp. Nu, verkantoj kutimiĝas al leteroj tiaj kaj foje ties aŭtoroj pravas; sed al ZZZ mi fidas. Aŭtoroj enkore scias (sed foje ne volas akcepti), kiam ili fatrason faris: ankaŭ kiam ili perlon produktis.

Tiam intervenis aliaj projektoj, aliaj ideoj, kaj ZZZ endormiĝis: el ZZZ fariĝis zzz. Kelkajn jarojn poste, kiam inspiro originale verki forestis, mi decidis vekti la 'per-version de konata historio' kaj ĝin esperantigi. Mi scias, ke al esperantistoj tre plaĉas teatraĵoj pri la kreinto de la lingvo (mi memoras, dum Universala Kongreso ie, ke la publiko tre – miaopinie tro – emociiĝis pri patosa scenaro el la familia vivo de Zamenhof). Pluse estas, ke la historio estas konata kaj do la publiko, spektante teatraĵon en ja 'dua' kaj almenaŭ fremdeta lingvo, sufiĉe facile kaptas la intrigon kaj do ne – kiel ofte okazas en la verda teatro (studu la publikon dum kongresa teatra prezentado) – rapide seniluziĝas kaj eĉ mezscene elŝteliĝas el la teatro.

Krome mi substreku, ke la Esperanta ZZZ ne estas rekta tradukaĵo el la angla originalo. Neniu el miaj teatraĵoj, kiuj ekzistas ambaŭlingve, estas tradukaĵo: versioj, jes; tradukaĵoj, ne. Ekzemple, en la angla versio de ZZZ enestas pli da (ofte komikaj) aludoj pri la lingvo-problemo, por atentigi nekonscian publikon pri monda malkomunikado; en la Esperanta versio troviĝas satiro rilate la Esperanto-movadon komprenebla nur al esperantistoj.

Por dramverkisto, prezentado de teatraĵo kronas la laboron. Poetoj kaj novelistoj bonŝancas: ilia sola rekvizito estas libro aŭ revuo; ne necesas aktoroj, publiko kaj scenejo por realigi la revon. Pro tio mi danku aparte al la reĝisoro de ZZZ, Colin Simmonds, kiu pro siaj ideoj vivigis nurajn surpaperajn literojn miajn; krome mi danku al ĉiuj aktoroj, kiuj rezignis pri valoraj kongreseroj por kunkrei kun mi la teatraĵon.

Eble kelkaj scenoj ne tiom efikis, kiom mi deziris. Nepris oble pli da provludaj horoj, ol ni disponis. Tamen mi ege kontentis, spektante – kaj aktore partoprenante – la teatraĵon. Humile mi proponis al la aktoraro, ke ni pritraktu la duan kaj trian aktojn dum la semajnfino 'Ni festivalu!' en Barlastono (16–18 januaro 2004; semajnfino parenteze malferma al diverspecaj grupoj, kiuj aranĝas siajn proprajn programojn). La aktoroj entuziasme jesis (kio ĉiaokaze pro la komentoj kaj la kritikoj multe helpas al mi poluri la teatraĵon). Ĉu tamen la ankoraŭ ne spektitaj aktoj de ZZZ estos prezentataj dum venonta kongreso dependos de multo: la bonvolo de la aktoraro kaj la havebleco de taŭga kongresa halo, ekzemple. Kaj ĉu venontjare okazos kongreso?

Egale. Espereble iam estos prezentataj la ceteraj aktoj de ZZZ. Kaj konsolu vin: eĉ se vi ne spektis la unuan akton, la intrigo de la du aliaj facile sekveblas. Jen la avantaĝo de 'per-versio de konata historio'. □

Atentu somerlernejanon!

La studlibron *Mondoj por la Somera Lernejo*

en Barlastono (9–15 aŭgusto 2003) mendu frue de la Oficejo de EAB. Por la plej lasta informo kaj prezo: tel. 0845 230 1887; rete: eab@esperanto-gb.org; (adreso sur p. 2).

Nord-Okcidenta Federacio radie kaj ĵurnale

La Nord-Okcidenta Esperanto-Federacio kunvenis la 3-an de majo en Preston. La etoso estis amika kaj komforta. Ni havis rapidan ĵarkunsidon kun la helpo de 'Kermit la Rano', post kio okazis gastprelego de Jack Warren pri 'Thomas Dallam, Granda Lankaŝirano'.

Thomas Dallam iĝis heroo en la jaro 1599 pro tio, ke li faris mirindan kombinitan horloĝon kaj orgenon kiel specialan donacon de Reĝino Elizabeto 1-a al Sultano Mehmeto 3-a de Turkujo. Dallam mem iris ŝipe al Istanbulo por persone prezenti la donacon al la sultano, kaj li spertis eventoplenan vojaĝon. Okazis grandega ŝtormo en la Markolo, lin trafis eskadro de sep pirataj ŝipoj, kaj oni pridemandis lin en la regno Alĝero.

Kiam la orgeno alvenis al sia adresito, ĝi estis difekta, do Dallam kun liaj helpantoj laboris dum dek tagoj por ripari ĝin. Li fine prezentis la orgenon al la sultano en granda ceremonio.

Konversaciaj rondoj divers-nivelaj finis la kunvenon.

Kelkaj lokaj ĵurnaloj raportis pri la kunveno, kaj Jim Voiels intervuiĝis de BBC Radio Lankaŝiro pri Esperanto kaj la federacia kunsido.

Jim Voiels

Ĉu nova grupo?

Ĉu vi loĝas apud **Swansea/Abertawe** kaj volas renkonti gesamideanojn kaj eble helpi starigi tiean Esperanto-grupon? Se jes, bonvolu skribi al mi! Richard Cobley (rete: <richcobley@yahoo.co.uk>), 20 Brynymor Crescent, Swansea SA1 4QH.

North West Esperanto Federation

— Aŭtuna Kunveno, 4 oktobro 2003 —

La programo ĉe Eaton Hotel, City Road, Chester (5 minutojn piede de la fervoja stacidomo) konsistos el:

• Alveno ekde 11h00: vendo de brokantaj libroj, loteribiletaj kun belaj premioj, interbabilado ks. (kafo/teo aĉeteblaj) • 12h30: bufedo (pladoj por veganoj kaj vegetaranoj) dolĉaĵoj kaj kafo/teo (en la kotizprezo) • 13h30: mallonga Federacia kunveno • 14h00: prezentos la memordistraĵon 'Antonia Rostron Van Ess' nia hispana gasto Eduardo Vargas-Gutierrez. La temo estos surpriza, kaj li kantos! • 15h00: te/kafo/teo; loterio • 15h30 (ĝis 17h30 plej malfrue): konversaciaj rondoj divers-nivelaj.

La kotizo estas £7,50, kiu inkluzivas ĉion krom trinkaĵoj kaj io ajn antaŭ la bufedo. Bv. sendi ĉekon – favore al 'North West Esperanto Federation' – al la kasisto, de kiu haveblas ankaŭ pliaj informoj: Ian Mac Dowall, 40 Danehurst Road, Wallasey, Cheshire CH45 2JJ. Tel. 0151 638 6802; rete: MacDowallian@aol.com.

FAKAJ ASOCIOJ

SPECIALIST ASSOCIATIONS

Cyclists international

Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI) organizes cycling events and party travel for both inexperienced and experienced cyclists using Esperanto.

Among other things, BEMI organizes parties to the annual Internacia Junulara Kongreso (IJK). For example, in 2002 BEMI organised two parties to the IJK in Strasbourg: one from London and the other from Barcelona. Some photographs of their arrival in Strasbourg are available on the internet at <http://ijkfotoj.free.fr/ijkbicikl.htm>. This was a great way to advertise Esperanto, as local radio stations and newspapers were present at the arrival in Strasbourg's main square.

Last year, the IJK took place in Brazil. BEMI did not organise an official party due to many members being unable to attend, but a couple of BEMI members cycled from São Paulo to Pato Branco and then around Brazil.

Parties are also organised to the Junulara Internacia Festivalo (IJF), which takes place each year in Italy in the Easter period. This year BEMI

members cycled from Nice to Savona for the IJF 2003.

Apart from parties to Esperanto festivals, BEMI also organises cycling holidays, for example a group of expert BEMI members cycled for two weeks in Ukraine and Russia.

Lately, BEMI has produced professional cyclists' shirts with the BEMI and Esperanto logos. Three BEMI members are planning to wear them when cycling the famous Paris–Brest–Paris route!

The next BEMI event is the party to the IJK in Lesjöfors, Sweden, leaving from Amsterdam in July. Information is available at <http://horizonto.free.fr/karavanoj.htm>.

Membership of BEMI is free, and all interested people can also participate in the internet discussion group BEMI@yahoogroups.com (<http://groups.yahoo.com/group/BEMI>).

A multilingual dictionary of bicycle terms is available at <http://bemi.free.fr/biciklo>.

More information can be found at <http://bemi.free.fr/eo.html> and <http://horizonto.free.fr> or you can phone Elizabeth on 01902 577543.

Elizabeth Cirio

Kio estas Vikipedio?

Vikipedio alinomiĝas ‘La Libera Enciklopedio’, konsultebla en la tutmonda teksaĵo ĉe <http://eo.wikipedia.org/>.

Vikipedio estas projekto kunlabore verki liberan, senpagan, plurlingvan enciklopedion per la interreto. Inter la lingvoj troviĝas Esperanto. La internacilingva fako ekis novembron 2001 kaj jam en aprilo 2003 havis pli ol 80 kontribuantojn el 27 landoj, kaj la Esperanta versio enhavas jam 7.000 artikolojn — kaj tiu nombro kreskas po proksimume 700 monate. Krome, la artikoloj en ĉiu lingvo estas interligitaj por ke plurlingvulo povu salti tuj al alia versio. Tiel, la kombinita sperto de fakuloj de ĉiu lingvularo disponeblas al la tuta mondo.

La nomo ‘vikipedio’ devenas

el la havaĵa lingvo, en kiu *wikiwiki* signifas ‘rapide’, eble ‘rapidege’. La vorton prenis usonanoj por nomi unikan specon de ttt-ejo kunverkata. Ĉiu leganto povas esti ankaŭ aldonanto kaj redaktanto, ĉar iu ajn rajtas verki artikolojn pri iu ajn temo.

Ne nur por komputuloj

Krome, la vikipedio estas informilo ne nur por homoj kun komputilo kaj retkonekto. Pro la liberiga permesilo GFDL (Libera Dokument-permesilo de GNU), iu ajn rajtas libere kaj senpage kopii la artikolojn kaj disvastigi ilin al tiuj, kiuj ilin bezonas.

Se vi deziras ricevi pliajn informojn pri la vikipedio, petu rete ĉe: paul@esperanto.freeseerve.co.uk, aŭ telefonu al 01472 840896.

Lerno-kompleto de ILEI

Nia internacia instruista ligo (ILEI) pretigas lernilojn precipe por pli junaj lernantoj kaj koncentras la atenton al studiloj, kiuj aperas nur en Esperanto.

Por komencantoj

Por komencantoj, la propono estas *Okuloj*, 44-paĝa kolore ilustrita kajero, pretigita por infanoj inter 6- kaj 10-jaraj. Ĝi prezentas 440 radikojn, el kiuj pli ol 40 estas verboj. Ili aperas en adekvataj kunteksto, tiel ke lernantoj dekomence scias ne nur la verbon sed ankaŭ la uzmanieron. Aperis ankaŭ *Okulo – Gvidilo* por la kursgvidanto. Ĝi resumas ĉiupaĝe la novajn vortojn, gramatikaĵojn, komunikajn lertojn, kaj krome prezentas praktikajn konsilojn kiel prezenti la paĝon kaj kiujn pliajn agadojn aŭ ludojn oni povas uzi. La dua parto de la gvidilo prezentas fotokopipretajn ekzercojn.

Por daŭrigi

Por daŭrigi la kursojn ekde la fino de la studado de *Okulo*, ni proponas kajerojn du kaj tri de la serio *Tendaraj tagoj*. Tiu transiro eblas, ĉar *Okulo* kovras la saman vort-trezoron kaj gramatikon kiel la unua kajero de *Tendaraj tagoj*, kiu ne plu haveblas de ILEI (sed eventuale restas ĉe iuj libroservoj). La dua kajero estas unuavice por lernantoj inter 10- kaj 16-jaraj; gvidila materialo por ĝiaj komencaj paĝoj estas trovebla en la hejmpaĝo de ILEI. La tria kajero de *Tendaraj tagoj* konvenas por lernantoj pli ol 10-jaraj, kaj uzblas eĉ por kursoj de la supera nivelo.

Kiel aldona helpilo, ni proponas grandformatan kantlibron de norvega kolego. Oni povas trovi pliajn informojn pri la verkoj ĉe www.edukado.net.

- *Okulo, kajero 1*, ilustrita de Monika Molnar; 44p. €4,50.
- *Okulo – Gvidilo por kajero 1*, ilustrita de Monika Molnar. €4,50.
- *Tendaraj tagoj, kajero 2*, ilustrita de Pavel Rak; 72p. €6,90.
- *Tendaraj tagoj, kajero 3*, ilustrita de Pavel Rak; 76p. €6,90.
- *Fantaziaĵoj kaj kantoj por infanoj* de Jon Rømmesmo; 100p. €3,60.

• Mendeblaj de la Libroservo de UEA (triona rabato ekde tri ekzempleroj por *Tendaraj tagoj*, ĉiuj titoloj plus sendokostoj; adreso sur paĝo 2). • Mendeblaj de ILEI (Poŝte: Pannonia u. 30 I 6, HU-1136 Budapest, Hungario. Rete: stefan.macgill@galamb.net), triona rabato por ĉiuj verkoj ekde tri ekzempleroj de ajna titolo, sendokostoj inkluzivitaj.

Ekpaku!

☆ **Plenan liston de aranĝoj** vidu en la Kalendaro en la marta numero de la revuo *Esperanto*, kiu konsulteblas ankaŭ ĉe: www.esperanto.hu/kaldendar.htm, aŭ sendu ajnan retmesaĝon al la aŭtomato: kalendaro@esperanto.org.

10–14 julio 2003

Baltaj Esperanto-Tagoj, Tartu, Estonio. Inf: Edda-Merike Pelt, Tõravere 1-6, EE-61602 Tartu. Fakso: +372-1-420339. Rete: bet39@hanza.net

12–18 julio

Ekotur 2003 Ekoturisma Renkontiĝo, Bohemia Karsto, Karlstejn, Ĉeĥio. Inf.: Kava-Pech, Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice. Tel. +420-257 712201. Fakso: +420-257-712126; rete: chrdle@kava-pech.cz

12–20 julio

76-a Kongreso de SAT, La Chaux de Fonds, Svisio. Inf.: SAT, 67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio. Tel. +33-147978705, fakso: +33-147977190; rete: satesper@noos.fr

14–18 julio

Somera Esperanto-Kurso, Heinävesi, Finnlando. Inf.: EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki. Rete: eaf@esperanto.fi

19–25 julio

Intimaj Temoj en Esperanto-Beletro. Internacia Esperanto-Konferenco de Osiek en Prago. Inf.: Kava-Pech, Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice, Ĉeĥio. Tel. +420-257-712201, fakso: +420-257-712126. Rete: chrdle@kava-pech.cz

19–26 julio

Internacia Junulara Kongreso en Lesjöfors, Svedio. Inf.: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-2015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel. +31-10-4361044. Rete: oficejo@tejo.org

22–26 julio

Inicado al Esperanto, praktikado de la lingvo, 2-a nivelo. Inf.: Kvinpetalo, FR-86410 Bouresse, Francio. Tel/fakso: +33-(0)549428074, rete: kvinpetalo@club-internet.fr

26 julio–2 aŭgusto

88-a Universala Kongreso. Gotenburgo, Svedio. Inf.: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel. +31-10-436144, +31-10-4361751, rete: kongreso@co.uea.org

2–7 aŭgusto

36-a ILEI-Konferenco en Örestrand, Svedio. Inf.: Boomee Kim-Lindblom, Stenbockens gata 102, SE-136 62

Haninge, Svedio. Rete: bomee.
kimlindblom@swipnet.se

9–15 aŭgusto

43-a Somerlernejo de Esperanto,
Wedgwood Memorial College, Barlaston
(vidu paĝon 6).

12–16 aŭgusto

**Pri Muziko kaj Praktikado de la
Lingvo,** Bouresse, Francio. Inf.:
Kvinpetalo, (vidu supre).

23–30 aŭgusto

**Internacia Esperanto-Semajno, Sète,
Francio.** De pli ol 20 jaroj ĉi tiu semajno
okazas en feria domo ĉe la mediteranea
marbordo. Tri kursnivelejoj atendas vin:
komencanta, perfektiga kaj paroliga. La
kursoj okazas matene kaj malfrue post-
tagmeze por ebligi al vi siesti, bani vin (la
marbordo situas je nur 100m) aŭ viziti la
regionon. Vespere okazos distra
programo. Inf.: Espéranto, 5 rue du
Docteur Roux, FR-34090 Montpellier.
Tel/fakso: +33-467.541.543; rete: yvienne
@netcourrier.com; www.perso.
wanadoo.fr/nikolao/esperanto.

23–30 aŭgusto

**Festo 2003 en Paimpol (Plouézec),
Bretonio.** Inf.: Cyrille Pouillet, 103 av.
Verdier, FR-92120 Montrouge, Francio.
Tel. +33 1 46 56 89 59, +33 6 77 28 13
25. Rete: cpouillet@oreka.com

27–31 aŭgusto

**71-a Itala Kongreso de Esperanto,
Ancona–Portonovo.** Inf.: Gruppe
Esperantista Marchigiano 'La Verda
Pego', Casella Postale 521, Ancona,
Italio. Rete: menghini.marco@libero.it

1–7 septembro

**Bretona Bubado en Monteneuf,
Bretonio.** Inf.: 15 Woodbridge Close,
Luton LU4 9DB, Britio. Rete: venu@
BretonaBubado.org

12–15 septembro

**Internacia Amikeca Renkontiĝo en
Aylesford.** Inf.: Anica Page, 7 Hampton,
Great Holm, Milton Keynes MK8 9EP.
Tel. 01908 564004 (vidu paĝon 6).

13–14 septembro

Aŭtunaj Tagoj en Raumo. Inf.: Eo-
Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15
C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando.
Rete: eaf@esperanto.fi

25–28 septembro


14-a Montkabana Renkontiĝo, aranĝo
por montmigremuloj kaj naturamikoj en
Tuk apud Mrkopalj, Kroatio. Inf.: Vanja
Radovanović, Horvaćanska 31,
HR-10 000 Zagreb, Kroatio, tel. +385-1-
913654626, rete: vanja.radovanovic@
etk.ericsson.se

26–28 septembro

**19-a Artaj Konfrontoj en Esperanto
en Poznań.** Inf.: Pawel Janowczyk, ul.
Zawady 2/7, PL-61-002 Poznań, Polio.
tel. +48-61-8755879; +48-602-283242.
Rete: janowczykpawel@poczta.onet.pl

KRUCVORTENIGMO

CROSSWORD PUZZLE



Horizontale

1. La tuto de la maĉaparato de la homo (7 literoj).
6. Trifingra mevo. (5).
8. Surtera gastropodo sen konko, kiu manĝas vegetaĵojn (6).
9. Sincere kaj respektoplene al Dio kaj religiaj aferoj (3).
10. Kvazaŭrimo kun samaj akcentaj kaj postakcentaj vokaloj kaj malsimilaj konsonantoj (8).
13. Tero, polvo, miksitaj kun akvo, sur strato, vojo ks. (4).
14. Antikva reĝo kun la povo ŝanĝi ĉion al oro, aŭ kun azenaj oreloj (6).
15. Nomo de Pariza universitato, fondita en 1257 (7).

Vertikale

1. Kontraŭo (3 literoj).
2. Sanskrita libro de la 4-a jarcento pri seksaj moroj kaj amora tekniko (9).
3. Ekmemori, ke oni jam aŭdis, vidis, legis ion (6).
4. Numeralo, esprimanta la nombron post sep (2).
5. Larĝa vojo, konstruita por veturiloj kaj kovrita per pavimo aŭ surpremita gruzo (5).
7. Ideala modelo, prezentanta altgrade en si la karakterizajn ecojn de iu speco de personoj aŭ objektoj (4).
11. Pomvino (5).
12. Ĉefo (5).
14. Ne kapabla havi larĝan vidon de la aferoj (radiko, 4).

Solvoj

1. Makzelo; 1v. Malo; 2. Kamassutro; 3. Ekkoni; 4. Ok; 5. Ŝoseo; 6. Kitiĉo; 7. Tipo; 8. Limaĵo; 9. Pie; 10. Asonanco; 11. Cidro; 12. Estro; 13. Koto; 14h. Midaso; 14v. Mito; 15. Sorbano.

26–28 septembro

16-a Internacia Kultura Festivalo, Ústí nad Labem, Ĉeĥio. Inf.: j_kriz@volny.cz

4–11 oktobro

**Internacia Esperanto-Semajno de la
Kulturo kaj Turismo** en Santa Susanna
(Barcelono). Kompletaj pensioj kostas

30 eŭrojn en dulita ĉambro por persono kaj tago; €36 en unulita ĉambro. Plenkolora faldfolio kaj aliĝilo estas haveblaj de s-ro Santiago Torné Grau (tel. +34-937253421), Apartat 423, ES-08200 Sabadell aŭ rete de s-ro Luis Serrano Pérez (ne dum aŭgusto): luis_serrano@mixmail.com. □